


# Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

NOVEMBRO - DECEMBRO

**1973** **6**

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

# KULTURAJ KAJEROJ

1973 NOVEMBRO-DECEMBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

**Komitatanoj :**

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

**El Grésillon**

**Esperanto tra la mondo** A. Frangeul

**Jugoslavio : La groto de Postojna**

**Globludo**

**La granda malsato**

**La nekonato** P. Boulogne

**Poemoj** S. Srokowski (Trad. J. Smykalski)

**Por via distro**

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn



# KULTURAJ KAJEROJ

**deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn tagojn dum la venonta jaro.**

## El Grésillon

Fine de oktobro la Konsilio de la Esperanto-Domo preparis la programon de la venonta jaro. Ĝi decidis kelkajn ŝanĝojn pli malpli gravajn. En 1974 la somera programo konsistos el nur tri periodoj trisemajnaj. La unua kaj la tria estos ĉefe dediĉitaj al kursoj diversnivelaj ; la dua al ciklo de prelegoj kun du aŭ tri ĉefaj temoj. Dum tiu dua periodo kelkaj ekskursoj ilustros tiujn temojn.

Dum la printempa periodo, fine de marto, okazos speciala seminario por informado kaj formado de la Esp.-instruantoj. La programo de tiu periodo konsistos el prelegoj pri instruado, pedagogio, metodologio kaj kursoj. En nia espero ĝi estos la unua paŝo al formado de grupo, kiel eble plej granda da Esp.-instruantoj pretaj instrui la lingvon laŭ la metodoj uzataj por la instruo de naciaj lingvoj.

Samtempe, sed nur dum parto de la seminario okazos la Printempa Kultura Semajno organizita de la junaj francaj esperantistoj sub la aŭspicioj de U.F.E.. Kompreneble ni esperas, ke la gejunuloj multnombro ĉeestos kaj ankaŭ partoprenos almenaŭ parton de la seminaria programo. Il devas konscii ke ili mem estos la instruantoj dum la venontaj jaroj, ke ili havas grandan rolon por ludi ankaŭ sur la instru-kampo. En la lernejoj, en ĉiuj landoj, junaj instruistoj esploras la instrumetodojn de naciaj lingvoj kaj faras eksperimentojn. La Esp.-instruantoj kaj instruontoj devas lerni metodologion. Ankaŭ tiamaniere ili helpos la junularon kaj laboros por la disvatigo de esperanto.

Kiel jam dirite en la antaŭa numero de la revuo, unu el la ĉefaj zorgoj de la respondeculoj de Grésillon estas krei kadron taŭgan por la kursoj kaj por la organizado de specialaj seminarioj por Esp.-instruantoj. La prelegsalono estos utiligebla eble dum la printempo, certe en julio. Dank'al la agado de la « Association Culturelle » kaj la malavareco de multaj amikoj jam multo estas farita. **Restas la internaj instalaĵoj por fari.** Taŭga plenumo de la bezonoj postulas daŭran financan helpon. Jam ĉiutage alvenas sumoj, sumetoj, kiuj permesas al ni pensi, ke la esperantistoj komprenas, ke ili helpas ne nur al plibonigo, al plikomfortigo de la grezijonaj instalaĵoj sed ankaŭ, sed ĉefe ebligas nin iri pluan paŝon sur la vojo al kreado de Esp.-instruantaro, nepra kondiĉo de disvastigo de la universala lingvo en la oficialaj lerno-programoj.

## ALVOKO POR LA KASTELO DE GRESILLON

La Kultura Asocio de la Kastelo Grésillon, 49150 Baugé, Francujo, alvokis, pasintjare, la esperantistaron por la konstruado de ĉambrego por prelegoj kaj kursoj.

Jam kun la sumoj ricevitaj oni povis komenci la laborojn, sed se la muroj kaj plafonoj estas nun en bona vojo, mankas la materialon por garni la ĉambregon.

Por aŭdi prelegojn oni bezonas sidigi la ĉeestantojn, por fari interesajn kursojn aŭdvida materialo estos bonvena, ankaŭ tabloj, tabuloj, k.t.p...

La Kultura Asocio de la Kastelo Grésillon alvokas la esperantistaron por la dua kaj lasta parto de la laboro por la ĉambrego.

Oni povas sendi la donacojn, eĉ modestajn al la kasisto S-ro Coussé Maurice, 11, rue Alain-de-Rougé, 72300 Sablé-sur-Sarthe (Francujo), aŭ per poŝta ĝiro al « Association Culturelle du Château de Grésillon » 2.512.77 Nantes.

René LLECH-WALTER.

# Esperanto tra la Mondo

## ANONCITAJ EKSKURSOJ DUM LA KONGRESO DE HAMBURGO

Dum la kongreso, okazos du tuttagaj ekskursoj : unu trajne kun dancvagonaro kaj restoracio al baltmara strando, la alia ŝipe sur la rivero Elbe al la urbeto Glückstadt. En Hamburgo mem ekzistas ankaŭ abundo da vidindaĵoj : haveno, malnovaj kvartaloj, lageto kun promenboatoj, bestĝardeno, k.t.p....

## SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ EN LIEĜO EN 1974

La dua sesio de la Someraj Universitataj Kursoj (S.U.K.) okazos de la 4a ĝis la 25a de aŭgusto 1974 en la Universitato de Lieĝo (Belgujo). La programo ampleksos la fakojn « socio-lingvistiko », « biologio », « kemio ».

La jenaj prelegantoj estas jam anoncitaj : Prof. Szerdahelyi (Universitato de Budapeŝt), D-ro Ralph A. Lewin (Instituto de Oceanologio, Universitato de Kalifornio), D-ro Carl Stop-Bowitz (Universitato de Oslo), D-ro Ŝin'itirô Kawamura (Universitato de Kagawa, Japanujo), prof. Balech (Argentina Muzeo de Natursciencoj). Skribi por informo al : Someraj Universitataj Kursoj, B.P. 9, B-4000 Liège, Belgujo.

## LA ESPERANTO-FAKO EN BUDAPEŜTA UNIVERSITATO

Tiu oficiala fako estas, kiel konate, gvidata de Prof. S. Szerdahelyi.

Ekde la dua studjaro, studentoj kiuj deziras frekventi la kursojn de esperantaj lingvo kaj literaturo, povas komenci per « Enkonduko al esperanta studo » (kiu ne ankoraŭ estas oficiala kurso).

Tiuj kiuj volas oficiale studi esperantologion, vizitas kurson kiu daŭras du jarojn.

Entute, la studentoj partoprenas 390 instruhorojn, 4 kolokvojn kaj unu ekzamenon. Krome, ekzistas « Scienca Student-rondo ». En la fako troviĝas 27 studentoj (kaj 10 en koresponda sekcio).

## ĈINA DELEGACIO EN LA JAPANA KONGRESO

Tri ĉinaj esperantistoj partoprenis la 60an kongreson de japanaj esperantistoj, en Komeoka, dum aŭgusto, kun pli ol 750 ĉeestantoj de Japanujo kaj eksterlando.

## LA PREZIDENTO DE F.R. GERMANUJO AKCEPTIS ESPERANTAN DELEGACION

S-ro Gustav Heineman, prezidento de Federala Respubliko Germanujo havis aŭdiencon en Bonn por kvarpersona delegacio de Germana Esperanto-Asocio.

Antaŭe, la delegacio vizitis la Ministerion pri Edukado kaj Scienco por renkonti la departementestron D-ro Rommel kaj la prilaboranton de la fako Esperanto. Tiu departemento respondecas pri lernejaj eksperimentoj.

Oni anoncis ke la ministro, S-ro von Dohnany estos la Alta Patrono de la venontjara universala kongreso en Hamburgo.

## ... KAJ SAME LA ISRAELA PREZIDENTO

Komence de Septembro, la prezidento de Israelo, S-ro Efraim Kasir akceptis esperantan delegacion. La prezidento esprimis simpation al la internacia lingvo, kiun li lernis kiam li estis knabo kaj ĝis nun komprenas. Lia patro estis agema esperantisto.

La delegacio donacis la unuan esperantan verkon aperintan en Israelo : « Verkoj de H. Heine ».

## DUM LA JUNULARA MONDFESTIVALO

Kvin-deko da gejunuloj de 6 landoj kunvenis en esperantista kunveno dum la Junulara Mondfestivalo en Orienta Berlino, dum aŭgusto. Multaj afiŝoj de T.E.J.O. pri kultura imperialismo estis gluitaj.

## LA SOCIALISTOJ KAJ ESPERANTO

La Itala Socialdemokrata Partio (P.S.D.I.) sendis leteron en itala kaj esperanta lingvoj al ĉiuj partioj aliĝintaj al la Socialista Internacio por ke tiuj partioj havu favoran sintenon por itala propono kiu sugestos la adopton de Esperanto en la rilatoj inter socialistaj organizoj, propono diskutota dum kunveno de la Internacio. Socialistaj esperantistoj agu ankaŭ en viaj propraj landoj !

## LA PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO

De la 1-a ĝis la 6-a de Oktobro disvolviĝis sur la scenejoj de Zagreb, Sisak kaj Karlovac en Jugoslavio, la VIa Pupteatra Internacia Festivalo. Partoprenis kaj ludis en Esperanto trupoj el Pollando, Hungario, Rumanio, Bugario kaj Jugoslavio.

Samtempe, infanan renkontiĝon partoprenis geknaboj-esperantistoj el Italio, Cekoslovakio, Hungario kaj Jugoslavio (43 entute).

Bedaŭrinde, pro ne sufiĉa subteno de la esperantistoj kaj fortaj atakoj enlande kontraŭ la uzo de Esperanto, la estonto de tiu festivalo estas necerta.

Nova pruvo ke, ĉefe sur la internacia tereno, la esperantistoj absolute devas ĉiam agadi konkorde kaj unuece !

## SCIENCISTOJ KAJ LA LINGVO INTERNACIA

La ĉeka revuo « veda a zivot » (La vivo kaj la scienco), eldonata de la Akademio de Ĉekoslovakio, publikigis plurajn artikolojn de la lingvosciencistoj de la universitato de Brno, Arnoŝt Lamprecht kaj Mirek Čejka, tre favorajn al Esperanto.

## RESTADO EN G.D.R.

Dum la somero de 1974, la franca Esperantista Labor-Federacio (179, rue Ordener, 75018 Paris) organizos dusemajnan restadon, je moderaj prezoj, en Germana Demokratia Respubliko.

## ANTAŬ 75 JAROJ NASKIĜIS U.F.E.

De Beaufront kreis la « Union Française pour l'Esperanto » en 1898. Tiu U.F.E. organizis la unuan universalan kongreson en 1905 en Boulogne-sur-Mer. En tiu datrevena jaro, U.F.E. inaŭguris novan sidejon 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris, kaj festis la eldonadon en la kolekto Assimil de perdiska kurso : « l'Esperanto sans peine ».

## LIBRO REELDONITA

Dansk Esperanto Forlag ĵus reeldonis « Patroj kaj filoj » de Turgenjev, en la traduko de « klasika esperantista aŭtoro » : K. Bein (Kabe).

# JUGOSLAVIO - LA GROTO DE POSTOJNA

Longa je 20 km. el kiuj 7 km. estas viziteblaj de la turistoj. Kalko ŝtonaj plataĵoj, altaj je 300 ĝis 600 m. superstaras la basenon de la rivero Pivka. Antaŭ milionoj da jaroj, la tereno-faldiĝoj okazigis rompadojn, kaj la Pivka parte perdiĝis en la subgrundon. Dum kelkaj centmiloj da jaroj, la pluvakvo, kiun oni estimis je 1 600 litroj po M2 ĉiujare, infiltriĝis en la fendetojn, unue nevideblajn, ilin larĝigis en fendegojn kaj formis grotojn kaj subterajn koridorojn. Survoje la akvo, ŝarĝita je karbona dioksido, sorbas kalkon (1 litro entenas 1/10 da gramo) kiun ĝi postlasas en la groto sub formo de stalaktitoj kaj stalagmitoj.

## VIZITOJ DE LA GROTO

La unuaj vizitantoj trovis ĉi tie bestajn ostarojn el la glacia epoko, kaj uzilojn el ostoj kaj ŝtonoj, kiuj elvokas la homojn, kiuj ŝirmiĝis en la kavernoj.

Oni eniras en la koridon de la Malnovaj Subskriboj ; tiuj ĉi datiĝas de la 13-a jarcento. La 17-a jarcento lasis rakontojn de la tiamaj vizitantoj. La priskriboj de Valvasor estas « fantastaj kaj superplenaj je hororaj bildoj ». En 1748 la matematikisto J. Nagel desegnis la unuan planon de la koridoro de la Surskribaĵoj kaj de la Granda Ĉambro. En 1789 la naturalisto kaj medicinisto B. Haquet vizitis la groton en periodo de sekeco, refutis la fantasmagoriojn de Valvasor, faris priskribojn pli ekzaktajn kaj parolis pri la dua etaĝo de la groto, tiu de la Pivka. En 1803 la germana verkisto Seume raportis, ke la loĝantoj de Postojna kondukis la vizitantojn ĝis la Granda Ĉambro, kiun ili prilumis pere de brulantaj pajlo-garboj. Por la vizito de Francisko la unua, imperiestro de Aŭstrio, oni decidis prilumi la groton per torĉoj kaj oleolampoj.



Okaze de tiuj preparadoj, Luka Ĉeĉ eskaladas rokojn kaj malkovras, en la 14a de aprilo 1818, la internajn partojn de la groto. De tiam la groto de Postojna iĝis fama en la tuta mondo. La turistoj venis pli kaj pli multaj. Hodiaŭ oni nombras 750 000 vizitantojn ĉiujare. Oni daŭre esploradis kaj taŭgaranĝis la groton.

Malgranda, senplafona trajno kondukas nin laŭlonge de mallarĝaj koridoroj longaj je 3 km. Instinkte, kvankam la alto estas sufiĉa, oni klinas la kapon por eviti tiujn enormajn rokblokojn, kiuj, dekstre, maldekstre, supere, ĉirkaŭas nin. Jen la koridoro nomita « Renversita ŝipo » kun ĝia konusa plafono, nigrigita de fumo kaj fulgo, sekve al eksplodo : dum la lasta mondmilito la germanaj soldatoj ĉi tien staplis benzinon kaj nafton. Partizanoj sukcesis ĝis ĉi tie eniri kaj ilin eksplodigi. Post la Gotika Ĉambro 20 m. larĝa kaj 13 m. alta, jen la Balo-Ĉambro, en kiu oni organizis balojn kaj distraĵojn, okaze de Pentekosto. La 12-an de septembro 1965 ĝi estis nomata Ĉambro de la Kongreso, ĉar 500 speleologoj el la tuta mondo ĉi tie kunvenis.

La elektra lumigo reliefigas la alton de la ĉambroj, la mallarĝecon de unu trairejo, la strangajn formojn de la rokoj al kiuj la homoj donis familiarajn nomojn.

Jen la fin-stacio. De nun ni sekvas, piede, nian gvidiston. Lia gvidista kaskedo ne gravigas lian junan vizaĝon. Kun torĉo ĉe mano, per grandaj lantaj paŝoj, zorgema je nia pli malpli lerta irado, li direktas niajn rigardojn tien kaj ĉi tien al tiu fea pejzaĝo. Ni eskaladas la Grandan Monton kaj ĉirkaŭiras enormajn blokojn, kiuj falis de la vastega plafono antaŭ 100 000 jaroj. Tiu plafono situas 300 metrojn super niaj kapoj kaj sen apogarkaĵoj. Nia vojeto serpentumas tra vera arbaro de stalagmitoj kaj stalaktitoj. Tamen tiuj ĉi estas raraj kaj lanco-formaj. Jen la ĉielskrapuloj altaj je 16 m., la Kristnasko-Patro, la Testudo, la Koko, la Ruinaĵo de Kastelo, la Mumioj, la Kolono, la Faldumita Kurteno, la Baldakeno, la Turo de Pizo, la Makaronioj.

La kunkreskaĵoj estas ruĝetaj, verdetaj laŭ la grundoj trairitaj de la akvo ; jen la Ĉambro de Tigro, la Ruĝa Ĉambro. En la Blanka Ĉambro, en la Vintro-Ĉambro, sur la grandega Brilianto scintilas pura blankeco. Maldikaj kalkaj tuboj resonas, kiam oni ilin frapetas. Bariero laŭiras abismon ; la Rusa Ponto, konstruita de rusaj kaptitoj dum la Unua Mond-milito, ĝin transpaŝas. Kelkaj kolonoj iras de tero ĝis plafono ; aliaj bezonos ankoraŭ multajn akvogutojn antaŭ ol esti finitaj.

La akvo obtuze muĝas en la profundaĵoj ; ĉi tie ĝi, gutope, fluetas kaj formas flakojn en kiujn la vizitantoj ĵetas moneron, simbole al ebla reveno. En tiu loko, senfine, akvo detruas kaj konstruas.

Jen la Ĉambro de la koncertoj. Kiam ekstere pluvas, ĝi estas abunde akvumita. Kiam la vetero estas bela, ĝi permesas, pro sia bonega akustiko, koncertojn voĉajn kaj instrumentajn.

La groto de Postojna estas lulilo de la biospeleologio ; ĝi liveris al la entomologoj kavernajn specimenojn ĝis tiam nekonataj. Luka Ĉeĉ ĉi tie kaptis la unuan kavernan koleopteron.

Ni haltas antaŭ malgranda baseno, en kiu naĝetas proteoj. Jam en 1768 tiu amfibiulo interesis la sciencistojn.

El la tre malproksima biologia pasinteco la proteo rifuĝis en la subgrundon, kie ĝi perdis sian vidkapablon. La juna proteo havas atrofiitajn okulojn, kiuj, ĉe la adoltulo, malaperas sub la travidebla haŭto, tra kiu, la besto sentas la lumon. En la akvo ĝi spiras per brankoj sed en la profundaĵoj de la Tero ĝi spiras pere de sakoj similaj je pulmoj. Ili reproduktiĝas per ovoj aŭ naskas vivantajn idojn. La proteo [illegible], neatingeblaj profundaĵoj ; nur la akvo-altiĝoj de la Pivka ilin alportas pli supren. La gvidistoj iras ilin serĉi por ilin montri al la turistoj. Sed nur 10-12 tagojn ili povas resti en la baseno ; post pli longa tempo ili mortos. Necesas ilin reporti pli profunden. Ni sentas kompaton por tiu rozeta, delikata reptilio ; ankaŭ, ĝi malfermas pordon sur la nekonateco de la malproksima pasinteco. Ĉu tiu besteto estas dekadenca specio rifuĝinta profunde en la Tero sekve de kelka kataklismo ? Ĉu ĝi estas transiro inter la fiŝoj kun brankoj kaj la mamuloj kun pulmoj ?

En tiu groto iom angordona, oni sentas la pezon de la Naturo. Dum jarmiloj ĝi transformis la grundojn kaj konservis la vivon ĝis ekstrema ebleco.

# GLOBLUDO

Tiu ludo, kiun ĉiu konas, konsistas el permana forĵeto de globoj, celante etan globeton : « la porketo ».

5 200 jarojn antaŭ Kristo la Egiptoj jam praktikis similan ludon. Pli poste ankaŭ Grekoj kaj Romanoj ĝin konis. Hipokrato laŭdis ĝiajn bonefikojn. Fenicoj disvastigis ĝin kaj alportis ĝin en Francujon : ĝi instaliĝis en Rodano-valo kaj en Provenco ; ĉi tie ĝi iom aliformiĝis : ĝi estas la « petanko » ; tio signifas en Provenco-dialekto : « kun kunigitaj piedoj ».

La globoj estis unue el ligno, precipe el bukso. Poste oni ilin najlizis kaj ferizis. Baldaŭ oni provis fabriki metalajn globojn.

En 1920 du lionaj inĝenieroj Paul Courtieu kaj Vincent Mille inspiriĝis je la kuglegoj fabrikitaj antaŭ kelkaj jarcentoj (la kuglegoj, interne konuse kavigita, entenis eksplodaĵon). Sed necesis trovi la taŭgan metalon, nek tro dura, nek tro mola, nek tro.



rompiĝema. La serĉoj de P. Courtieu daŭris 3 jarojn ; nur en 1923 metala globo estis realigita. De tiam multaj entreprenoj, la plejmulto metiistaj, fabrikas ludglobojn. Hodiaŭ la liona regiono liveras globojn al 170 000 ludantoj kaj al « petankuloj ».

## Kiamaniere ili estas fabrikitaj ?

Komence estas sfera kerno el sablo, dotita je ferlada akso. Oni ĝin lokas en ŝtalan muldilon, kies sfera kavo estas pli granda ol la kerno. Fandiĝanta metalo (miksaĵo de kupro, aluminio kaj aliaj noblaj metaloj) plenigos la malplenon inter kerno kaj muldilo ; tiamaniere oni havos metalan globon, kiu entenas la kernon.

## Sed pli subtila estas la fabrikado

Oni verŝas la brulantan likvaĵon en kanaleton ; ĝi iras ĝis malsupre kaj resuprenîras, laŭ la principe de la interkomunikaj vazoj, laŭ 2 aliaj kanaletoj ĝis la kavo, kie estas la kerno. Kiam la metalo estas solidigita, la muldisto malfermos sian muldilon kaj li elprenos globon ekipitan je ia ĉaskorno ŝajne veninta el alia mondo.

Kial tiu procedo ?

Nur ĉar « la malpuraĵo » de la metalo restas ĉiam sur la supraĵo, kiel la kremo sur la lakto. La metalo ĝin puŝas antaŭ si ĝis la supro de la muldilo, kiu estas pintforma ; ĉi tie la malpuraĵo « kaziĝas ». La pintaĵo ĉi tie formita estas eltranĉita kaj ĵetita. La metalo formanta la globon estas, dank'al tiu procedo, pura kaj « sen pajlo ». La ĉaskorno de la fandiĝo-kanalo estos rompita kaj refandita. Restas la sfero entenanta la sablan kernon kaj traiĝita de la leda akso. La kerno estos bruligita kaj la akso eltirita per potenca mekaniko.

Oni havas globon perfekte malplenan kun du truoj ĉe siaj polusoj. Tiuj truoj estos ŝraŭbigitaj por ke oni povu alŝraŭbi ŝtopilojn.

## « Ludio » en bano de hidrargo

Necesas « torni » la globon, por igi ĝin perfekte glata : ĝin torni kaj ĝin ekvilibrigi. Ekvilibrigi ĝin estas ĉefa por bona ludado. Post unua rapida skizo, ekvilibrigado estas efektivigata laŭ tre simpla procedo : la globo estas lokita en basenon entenantan hidrargon, en kiu ĝi naĝas, kiel « ludio ».

Kompreneble ĝia pli peza parto baskulas malsupren. Oni markas la supron de la globo ; poste oni prilaboras la kontraŭan parton ĝis oni havas sferon perfekte ekvilibrigita.

## Personigitaj globoj

Pezo kaj diametro permesas klasigi la globojn laŭ la deziro de la klientoj oni ilin strios. La globludonto havos globojn perfekte adaptitaj al sia mano, al la loko, kiun li okupas en la teamo, kaj al sia propra gusto.

La metalaj globoj estas pli solidaj ol la lignaj. Ili povas esti malgrandaj kaj pezaj aŭ inverse, dikaj kaj leĝeraj.

Diametro kaj pezo estas fiksitaj fare de la Internacia Federacio pri globoj ; ĝi ne devas superi 1 300 gramojn kaj ne malsuperi 700 gr. La minimuma diametro estas 90 mm. (88 por la plej junaj). La dureco de la metalo ankaŭ estas fiksita ; ĝi situiĝas inter 35 kaj 90 Rockwell.

Kun tiuj bonaj kondiĉoj la ludantoj povas esprimi sian talenton kaj fariĝi ĉampionoj (ili estas multaj) en la globturniroj.

# NIA GALAKSIO

La vorto Galaksio estas de greka deveno (gala = lakto).

La plej direkta manifestiĝo de nia Galaksio estas la Lakta Vojo, lakteca trenaĵo, kiu trairas la ĉielon. El ĝia nomo oni eltiris la vorton Galaksio.

Nia Galaksio estas aro da steloj inter kiuj troviĝas nia Suno.

**Ĝia MALKOVRO** : Estas Galileo (1564-1642), kiu la unua montris, ke la Lakta Vojo estas konstituita el nenombreblaj steloj. En la komenco de la 19-a jarcento Herschel deduktis el siaj observadoj, ke Suno ne situas centre de la Galaksio. La 20-a jarcento alportis pli ekzaktan ideon de la galaksiaj dimensioj. De tiam la radio-astronomio permesis esplori la malproksimajn regionojn de la Galaksio kaj ĝian strukturon.

## Konstituantoj de nia Galaksio

Ĝi konsistas el Steloj izolitaj aŭ arigitaj en amasojn, Interstela gaso, esence el hidrogeno, Interstelaj polvoj, kies naturo estas ankoraŭ ne bone konataj, Eroj (partetoj), de forta energio, kiel la kosmaj radioj ; ĉiuj tiuj konstituantoj estas malsame dispartigitaj en la Galaksio.

Nune oni distingas du specojn de steloj. La junaj steloj proksimume aĝaj je $10^6$ jaroj, kies metala enteno estas tre granda. La maljunaj steloj aĝaj je $10^9$ jaroj kies metala enhavo estas malforta. Kompreneble inter tiuj ekstremaj stel-popoladoj ekzistas kontinua gradacio.

## Priskribo de la Galaksio

La Galaksio similas **diskon** kies radiuso egalvaloras 45 000 lum-jaroj. Nia Suno troviĝas en tre ekscentra pozicio situa je 30 000 lumo-jaroj de la Galaksio-centro.

La **Spiralaj Brakoj,** de forta denseco stela kaj interstela, disvolviĝas ĉirkaŭ la centra kerno de la Galaksio ; tiu ĉi entenas tre fortan stelan koncentradon. Ĉirkaŭ la disko troviĝas la Haloo, proksimume sfera ; ĝi entenas arojn tre densajn da malnovaj steloj (pli ol 100 000 steloj). En la spiralaj brakoj la steloj estas pli junaj.

La **Interstela Gaso** estas, kiel la steloj, esence konstituita el hidrogeno ; la gaso estas dispartigita en la galaksio-disko en diskretaj nuboj el hidrogeno neŭtra aŭ ionigita ; ili estas de malgrandaj dimensioj (proksimume unu lumo-jaron). La meza denseco de tiu gaso estas ĉirkaŭ 10 atompezoj por unu $CM^3$.

La stela gaso ionigita estas komplekse dispartigita ; ĝi montriĝas al ni per sia radiado optika kaj radioelektra ; ĝia temperaturo estas proksimume je 10 000° K. La stela gaso el neŭtra hidrogeno, neregule dispartigita en la spiralaj brakoj estas observebla nur pere de radio-elektro sur la ondo-longo je 21 cm. (Kio estas - 173° C. proksimume).

La **Interstelaj Polvoj** ankaŭ ili estas neregule dispartigitaj. Oni ilin nerekte detektas pere de la efikoj, kiujn ili produktas sur la radiadoj de la astroj. Tiuj efikoj estas absorbo, ruĝigado, difuzo, kaj polarizo de la lumo. La tuta maso de tiuj polvoj ankoraŭ ne povas estis taksitaj. Oni ankoraŭ ne sukcesis determini la naturon de tiuj polvoj.

## Movo de la Galaksio

Ĉiuj steloj de la Galaksio moviĝas. Analizo de tiu movo montras, ke, laŭ niaj okuloj, ĝi konsistas el **movo de la ensemblo** ŝuldita al la gravito-fortoj, kaj **rezidua movo** analoga al la Brown-a movo, hazarde dispartigita, kaj kiun oni povas difini nur statistike.

La malnovaj steloj en la Haloo havas feblan ensemblo-movon kaj grandan reziduan movon. Kontraŭe, la junaj steloj de la Spiralaj Brakoj havas feblan reziduan movon kaj grandan ensemblo-movon : estas rotacio ĉirkaŭ la Galaksio. Sed tiu rotacio ne estas unuforma. La galaksia disko ne turniĝas kiel solida korpo ; kiam oni malproksimiĝas de ĝia centro la rotacia rapideco pligrandiĝas laŭ la distanco ĝis 20 000 lumo-jaroj. Poste ĝi malgrandiĝas en la periferio. Oni pensas, ke la Galaksio turniĝas en la senco de la volvado de la spiralaj brakoj.

**La Suno** situas je 30 000 lumo-jaroj de la Centro, turniĝas kun rapideco je 250 km./sekundo kaj efektiviĝas kompletan rivoluon en 240 milionoj da jaroj.

La orbitoj de la Steloj, situaj en la galaksio-plano, estas preskaŭ cirklaj, dum tiuj de la Haloo-steloj efektivigas elipsojn tre longajn ; ilia fokuso estas la galaksio-centro. La centraj regionoj de la Galaksio havas kompleksajn strukturojn kaj estas ankoraŭ malbone konataj ; freŝdate oni observis 2 movojn : ekspansion kaj maldilatiĝojn ankoraŭ ne klarigitajn.

## Evoluado de la Galaksio

Nune oni opinias, ke la Galaksio formiĝis proksimume antaŭ $10^{10}$ jaroj el granda nubo nomita Protogalaksio. La forta denseco de tiu nubo malpermesis disiĝon de la Materio (disiĝo, kiu devus rezulti de la « Ekspansio de la Universo »). Sub efiko de sia propra gravito-kampo, la Protogalaksio sinkis sur sin mem : estas la fazo de la sinkado : gravita kolapso, relative mallonga, en la vivo de galaksio.

En ĉi tiu momento formiĝis la malnovaj steloj. Post la sinkado, la protogalaksio prenis sferan formon kaj rotacio komenciĝis ĉirkaŭ pretera akso. Sub ago de tiu rotacio, tiu sfera maso baldaŭ platiĝis laŭ plano perpendikla al la rotacio-akso.

La Disko kaj Kerno de tiam estas formitaj. Oni ankoraŭ ne solvis la problemon de la kondensiĝo de tiu maso en stelojn. Sed oni posedas kelkajn indicojn, kiuj montras, ke la steloj formiĝas el la interstela Materio.

La eksplodo de la supernovaoj kaj novaoj alportas al la stela materio pezajn elementojn, kiel feron. Tial, la kemia komponaĵo de la novaj steloj diferencas de tiu de la malnovaj steloj, formitaj el la komenca nubo.

La nocio de novaj kaj malnovaj steloj estis enkondukita de Baade en 1944 ; ĝi estas esenca por inter-

preti la evoluigajn fenomenojn de la Galaksio.

Kiuj estos la pluaj etapoj en la evoluado de nia Galaksio ? Nur la fenomenoj, kiuj manifestiĝas skale de la Universo permesas esprimi hipotezojn.

## ALIAJ GALAKSIOJ-NEBULOZOJ

Ili estas sistemoj da steloj kompareblaj al nia Galaksio kaj situaj ekstere de ĝi. Kiam oni ilin observas helpe de instrumento, ili prezentiĝas sub aspekto de difuzaj makuloj. Oni nomis ilin Nebulozoj. Invento de la spektroskopio permesas ilin studi. Kvankam la dispartigo de la galaksioj en la Spaco estas unuforma ĝis 2-3 miliardoj da lum-jaroj, ili tendencas grupiĝi en galaksioj-amasojn. Tiaj aroj povas enteni centojn aŭ milojn da galaksioj. La plej proksima el tiuj amasoj estas tiu de la Virgulino, kiu situas je 20 milionoj da lum-jaroj.

### Radio-Galaksioj

Nova scienco, la radio-astronomio permesis kompletigi la konatajn donitaĵojn pri la galaksioj, dank'al la radio-elektraj informoj. Intensaj emisioj pruvis, ke ekzistas aliaj radio-fontoj ; 8 000 estis jam detektitaj. En kelkaj kazoj, tiu radio-elektra emisio estas unu milionfoje pli intensa ol tiu de nia propra Galaksio. Oni ilin nomas Radio-Galaksioj.

Oni pensas, ke eksplodoj en la kerno de Galaksioj transformas tiujn ĉi en radio-galaksiojn. La energio de tiuj radio-galaksioj estas enorma ; ĝi atingas 10 ergojn. Oni pensas, ke tiu radio-elektra emisio estas ŝuldita al elektronoj, de alta energio, akcelitaj en magneta kampo (sinkrotono-emisio).



### Kvazaroj

Tiuj radio-fontoj estas asociataj al objektoj de stela aspekto. Tial oni ilin nomas « Fontoj kvazaŭ steloj » (Kvazaroj). Oni malkovris 9 kvazarojn en 1964 kaj nune 150. Multaj problemoj restas solvendaj.

## FANTASTA KATAKLISMO EN NIA GALAKSIO

Antaŭ kelkaj semajnoj okazis en nia ĉielo enorma evento. Antaŭ kelkaj semajnoj, tio signifas antaŭ 25 000 aŭ 35 000 lumo-jaroj, ĉar tia estas la tempo necesa al luma mesaĝo por alporti al ni la sciigon.

Tiu evento, pri kiu la astronomoj ĵus sciis estas neimagebla kataklismo : mondo-fino, kiu eble neniigis sunojn kun ilia akompanantaro da steloj, ie, en perdita angulo de nia galaksia universo. Oni scias, ke la lumo de la steloj estas nur febla parto de la radiado, kiun ili emisias. Radiado, kiu entenas diversajn radiojn, de la radio-ondoj ĝis la X-radioj. X-radioj tute ne kapablas trairi nian atmosferon por alveni ĝis niaj receptiloj. Tial oni estas devigataj ilin kapti en la Spaco-mem. Estas la ofico de la artefaritaj satelitoj. La amerika satelito Uhuru kapablas detekti X-radiojn de 0,5 ĝis 5 anstromojn, kaj de energio je 2 000 ĝis 20 000 elektronoj-voltoj. Tial, dank'al Uhuru, oni sukcesis lokalizi centon da X-fontoj, inter kiuj la plimulto estas eksplodo-restaĵoj de novaoj. Unu el tiuj X-fontoj situas en la konstelacio « la Cigno » baptita « Cigno X-3 » ; ĝi estas malforte perceptebla ĉe la radio-teleskopo. Nu, en la nokto de la 2-a de septembro 1973, Kanadaj radio-astronomoj konstatis, ke la radio-radiado de tiu astro, kvazaŭ neatentinda antaŭ kelkaj tagoj, subite estis iĝinta tiel enorma, ke la receptilo estis el ĝi bruske saturita.

Alidire, se la homaj okuloj estus povintaj vidi la radio-elektrajn ondojn, la astro estus aperinta pli brila ol la Suno. Ankaŭ la eŭropaj observatorioj faris saman observadon kaj tiu de Meudon eĉ sukcesis lokalizi la respondan astron : inter du brakoj de la galaksia spiralo ; tio estas proksimume je 25 000 ĝis 35 000 lum-jaroj.

Kiamaniere klarigi fenomenon tiel eksterordinaran. La astronomoj, ĝis nun, faras nur hipotezojn : la plej logika sed ankaŭ la plej fantasta estas la jena : temus pri giganta stelo, kiu, sekve al internaj kataklismoj, sinkis sur sin mem. Pro tio, la denseco de ĝia materio iĝis milonoj aŭ miliardoj da fojoj supera al tiu, kiun ĝis nun, oni konis. Tiam la gravita kampo iĝis tiel potenca, ke ĉiuj radiadoj emisiitaj de la astro restis kaptitaj en ĝi ; neniu eskapis kaj la stelo aperis al ni kiel nigra truo, kies temperaturo estis de $10^{11}$ ĝis $10^{12}$ absolutaj gradoj, kaj ĝi emisiis superpotencajn X-radiojn.

Estonteco diros ĉu tiu hipotezo havas kelkan realecon. Sed, de nun oni povas revi pri giganta eksplodo, kiu eble enabismigis tutan universon meze de ŝprucado de K-radioj, fenomeno, kiu tradukiĝis nur per kelkaj nenormalaj eksaltoj de niaj registrantaj instrumentoj.

## MISTERAJ SIGNOJ EN LA ĈIELO

Misteraj signoj venantaj el la ĉielo estis registritaj de sovetaj sciencistoj. Ili demandas sin ĉu temas pri mesaĝoj emisiitaj de ekster-Tera intelektuloj.

Estas la Tass-agentejo, kiu raportas tiun informon. La intervaloj inter la emisioj estas regulaj. Tiuj signoj povas elveni nur el la artefaritaj satelitoj de la Tero ; ilia origino situus aŭ en la alta atmosfero aŭ en ia alia planedo aŭ stelo. Samuel Kaplan, profesoro en la Universitato Gorki, estas la unua, kiu kaptis tiujn signojn ; poste diversaj sovetaj observatorioj ankaŭ ilin registris.

« Oni ne ekskluzivas, indikas la Tass-agentejo, ke ili povas esti emisiitaj de ekster-tera civilizacio, jam atinginta altan teknikan evoluadon ».

# LA GRANDA MALSATO

Longa je 2 650 km., larĝa je 1 300 km., alta ĝis 3 000 m., dika je 3 000 m., tia estas tiu mirindega glacio-verto, kiu kovras Groenlandon. Tra la noĉoj de la montoj elfluas, ĝis Oceano, la enormaj glaciejoj, kiuj en la maro, rompiĝas en gigantajn glaciblokojn. Tiuj ĉi, dum la 8-10 vintraj monatoj, lutiĝas al la interna dezerto. La bankizo iĝas kompakta ; neĝo kaj ventoj ĝin niveladas.

Eskimoj vivas tie ĉi. En 1884, kiam Gustav Holm ilin malkovris, en la regiono de Angmagssalik, ili estis nur 400. Estis post la teruraj vintroj de 1882-1883, kiam regis la Granda Malsato. Antaŭ kelkaj jaroj, P.E. Victor vivis kun Eskimoj, sub ilia tendo. Al li oni rakontis la hororajn okazintaĵojn.

Vintro anonciĝis severa. La ĉasado estis senprofita, kaj la pornutraĵaj kaŝejoj malpleniĝis. En la fino de la somero, eĉ ne unu anasflugado preterpasis ; la vulpoj estis jam manĝintaj vagan hundon ; eĉ ne atendante la unuan neĝon, la korvoj kuniĝis cirkaŭ la tendo kaj tute nehaste forflugis, kiam oni ilin forpelis ; ankoraŭ neniam ili montris tiel kriaĉantan impertinentecon.

Dum la multaj vintraj monatoj oni restis nenion sciante pri Nounaguitsek, la domo perdita malproksime en sudo kaj kie loĝis Sakatsiak kun 50 personoj. Kiam venis printempo, la frato de Sakatsiak decidiĝis : « Oni diras, ke, en Sermidik, okazis la Granda Malsato, ke ili nutriĝis je homoj, ke, en Nounaguitsek restas neniu, ke ĉiuj mortis. Mi volas vidi ».

La viro, en sia kajako, direktiĝis al sudo.

La cielo estis griza, peza, preskaŭ kompakta. Kvankam la viro estis tre malproksime, ventoblovo alportis al li putran odoron. Li albordiĝis kaj grimpis al la tendo. La odoro estis tiel fortega, ke li pensis sufoki. Tuj li ekvidis la lignajn skeletojn de la « umiako » (la ŝipo farita el ligna skeleto kaj oleitaj haŭtoj) kaj de la kajakoj. Antaŭ la domo kuŝis kadavroj, kies vizaĝoj estis duone formanĝitaj de la korvoj kaj vulpoj. Li transpaŝis la korpojn, haltis antaŭ la domo, kaj diris : « De vi ĉiuj, ĉu estas plu neniu ? » ; lia tremanta voĉo ne povis eliri el lia gorĝo. Tamen, plej forte kiel eble, li kriis : « Tie ĉi, el vi ĉiuj, ĉu estas plu neniu ? ». La silento lin terurigis. Subite li sentis siajn kruroĵn malfortiĝi ; forfuĝa deziro violente kaptis lin ; tremanta murmuro respondis : « Jes, estas mi ». — « Kiu, ci ? » — « Mi, Ajatok ».

Li iris al sia kajako, prenis tri pecojn da graso kaj ilin ĵetis en la domon ; « Prenu, manĝu, mi iras serĉi umiakon » ...

Subite, en la koridoro, io moviĝas. La viro, timigita, restas en la ŝipo : ŝi eliras ; ŝi rampas sur la kubutoj, sur la manoj ; ŝi puŝas sian kapon antaŭ si ; ŝi turniĝas flanken, trenante post ŝi siajn gambojn ; ŝi leviĝas sur unu kubuto ; ŝi estas tute nigra ; ŝi haltas ; ŝi metas sian vizaĝon en la neĝon ; ŝi gratas per la pinto de siaj fingroj, malforte, kiel iu, kiu mortas ; ŝi ne plu povas moviĝi... Denove ŝi leviĝas ; ŝi rampas ĝis bordo de la akvo ; frostotremo ŝin skuas ; ŝia vizaĝo estas tiu de skeleto, ŝia buŝo estas enorma, la lipoj estas sekaj, gluitaj sur la gingivoj preskaŭ blankaj ; el profundaj malhelaj truoj, ŝiaj okuloj, larĝe malfermitaj, rigardas sed nenion vidas ; sur la vangostoj, la haŭto streĉiĝis, kvazaŭ ĝi tuj fendiĝos ; la ungoj estas longegaj.

La viro levas ŝin por eniri en la umiakon ; ŝi falas en la ŝipon ; ŝi restas kvarpiede, senmova, kun la kapo sur la fundo, preskaŭ senspira.

## AJATOK RAKONTAS

La malsato turmentis ĉiujn ; iun tagon oni boligis la foko-grason de la lampoj ; kiam ne plu estis lampo, estis malvarme ; la glacio alkroĉiĝis ĉe anguloj de la fenestroj, kaj, iom post iom, kovris ĉiujn benkojn. Juna virino mortis, lasante post si bebon, kiu nepre bezonis lakton. Oni tiris la virinon eksteren, oni metis la bebon en malnovan tombon ; dum la tuta nokto oni aŭdis ĝiajn ĝemojn... Maljunulino ĵetis sin en la maron.

Viro diris : « Estas ankoraŭ miaj tri hundoj », li eliris kaj revenis tirante post si la hurlantajn bestojn ; iliaj kapoj ŝajnis enormaj fine de la magra kolo ; ilia spino kaviĝis de iliaj skapoloj ĝis la lumboj ; la ripoj estis elstaraj kaj la ventro ĉesiĝis ĉe la spino. Li ligis la malantaŭajn kruroĵn de la plej granda al tegmenta subtentrabo; li metis ŝovnodon ĉirkaŭ ĝia kolo, sidiĝis teren puŝis siajn piedojn ĉe slabo kaj tiris : la hundo ĉesis hurli sed daure agitiĝis. « Helpu al mi, diris la viro, mi ne plu havas forton ». Tri viroj kuniĝis sian malfortecon. La karno de la tri hundoj daŭris pli ol unu lunon.

— « Restas la haŭtoj kaj la rimenoj de mia umiako kaj de la kajakoj ». Ili trančis la rimenojn kaj la haŭtojn en malgrandajn pecojn ; por fandi la neĝon oni, unu fojon plu, elprenis trabon el la tegmento. Oni trempis la pecojn en la granda pelvo kaj oni faris partojn.

La maljuna Itawak mortis ; oni metis lin eksteren ; poste ankaŭ liaj du filinoj : unu nokton la silento estis rompita de iliaj krioj, la morgaon oni trovis ilin brakumantajn, mortajn. Kiam la edzino de Itawak eliris el la tendo, ne-

niu demandis ŝin ; oni estis kompreninta ; oni aŭdis ŝiajn klopodojn en la koridoro ; sur la sojlo ŝi aperis, kun distaŭzitaj haroj, tirante post si la kadavron de sia edzo. Kiam la korpo estis dispecigita, la pecoj kuiritaj, la virino disdonis ilin al ĉiuj...

Ipek kuŝas kun sia bebo ĉe sia sino ; ŝi aŭdis murmurojn : « Mi malsatas, diras Iguinaadek al sia edzino ; — Ankaŭ mi, mi malsatas, mi malsatas je blanka viando ; — Jes, je blanka viando ; — Kial ni ne manĝus tiun ĉi, kiu kuŝas apud ni kun sia bebo ?... Jam de la tagiĝo, Ipek foriris kun sia bebo : « Mi volas serĉi mus-




kojn » ; ŝi ne plu sentis malvarmon nek malsaton, sed en sia sino grandan brulon, kaj en sia gorĝo ; ruĝa makulo dancis antaŭ siaj okuloj ; ŝi iris ĝis la bankizo ; ŝi rigardis en truon : la tajdo estis malalta ; sub la glacio alkroĉita al la tero brilis ŝtonetoj lavitaj de la maro, kiu estis forfluinta ; « ĉi tie », ŝi diris ; ŝi prenis la bebon per unu mano kaj glitigis ĝin tra la truo ; ĝi falis sur la ŝtonojn kaj ekploris ; « Ne ploru, mi venas » ; ŝi pasis tra la truo, sidiĝis, prenis la bebon sur siaj brakoj, metis mamon en sian buŝon. Super ŝi, la glacioj alkroĉitaj al la tero sidis sur blokoj, kiuj, dum la alta tajdo, flosos ; la blua tegmento longe kliniĝis ĝis la ŝtonoj ; kaj, pli malproksime ; en tiu nubo, kie ili perdiĝis, bruis la maro. La infano mamsuĉis, ne sentante la malvarmon ; ŝi, dum momento, ĝin kaĵolis ; poste ŝi stariĝis kaj malsupreniris al la maro.

Aliaj infanoj mortis, kaj virinoj, kaj viroj.

La du junaj virinoj rigardis la randon de la krutaĵo, la akvon verdan kaj nigran, la glaciojn. La pli aĝa diris : « Kiu el ni iros la unua ? — « Mi, se ci volas, estas pli certe » — « Bone, iru, mi tuj retrovos cin » ; ŝi hezitas, ŝi rigardas « Mi ne povos salti ! » — « Nu, provu, malantaŭe, estas pli facile, kiam oni ne vidas la maron » ; ŝia kapo frapis glaciblokon, kiu krakis ; la alia vidis ŝiajn okulojn fermiĝi kaj ŝian korpon molan rekte sinki, sen iu movo; « ŝi havas ŝancon, ŝi pensis antaŭ ol salti ŝi estis batmortigita ».

Kiam Iguimadek revenis en la tendon, lia edzino estis forpreninta la jakon de la mortinta knabino kaj distranĉis ŝin kiel fokon ; unue la ventron por eligi la internaĵojn. — « Portu eksteren la internaĵojn ». Poste, per sia tranĉilo, Iguimadek zorge gratis la vertebrojn ; kelkajn tagojn pli poste, li eliris por manĝi la internaĵojn.

Aliaj ankoraŭ mortis en la tendo ; oni ilin lasis sur la platformo apud la postvivantoj. Iun tagon virino etendis la manon kaj tuŝis sian najbarinon : « tiu ĉi ankaŭ mortis, ŝi ne estas tiel magra, nu, decidiĝu » — « Ne, ci, tranĉu, ci estas apud ŝi » ; — « Mi ne povas, mi estas tro malforta » — « Ajatok povas helpi al ci » — « Ne, ne, mi ne volas manĝi el homo ».

Ili tranĉis pecojn ĉe la suroj, ĉe la sidvangoj ; tiu viando estis dura kiel frostita foko, sed ĝia gusto esti pli sukera.

Baldaŭ la hom-manĝintoj malsaniĝis ; ili « transformiĝis en akvon ». Sur la platformo, miksitaj unuj kun la aliaj, troviĝis disŝiritaj kadavroj, disenteriuloj kaj Ajatok.

Dum tagoj ŝi aŭdis la spiron de la malsanuloj. Sed, iun nokton, ŝia duondormo estis skuata de nova impreso : totala silento, tiu de la morto ; ŝi estis la nura postvivanto.

Ŝi rampis sur la grundo ; ŝi hisis sin sur la tegmenton ; ŝi gratis la neĝon ; ŝi elprenis la ŝtonojn ; ŝi tiris la haŭtojn pezajn, grandegajn ĝis en la domo ; ŝi relokis sin meze de la mortintoj.

Dum pluraj monatoj ŝi nutris sin per tiuj haŭtoj duraj kaj gluecaj ; malgraŭ ŝia ekstrema malforteco ŝi gratis la teron, kiu ilin kovris ; ŝi tranĉis pecetoin, kiuin ŝi metis en sian buŝon kun iom da neĝo. Kiam tiu granda surfaco da haŭto estis konsumita, ŝi manĝis la vestojn de la kadavroj...

# LA NEKONATO

## Uuna sceno. Paŭlino - Albertino.

(Sur trotuaro de Boulevard Arago en Parizo iras du junulinoj mezrapide kaj interparolas gaje).

Paŭlino. — Eĉ se oni ŝatas sian laboron, sabato estas agrabla momento, precipe vespere.

Albertino. — Plej agrabla je la fino de somero, kiam tagoj estas ankoraŭ ete longaj, varmo elportebla, aero malpeza.

P. — Rigardu la viron kiu marŝas antaŭ ni.

A. — Ŝajnas ke vino helpis lin elporti someran varmon.

P. — Li forgesis ke inter du punktoj, rekta linio estas la plej mallonga vojo.

A. — Verŝajne nenio urĝas lin, ĉar li haltas.

P. — Nu, li falas. Albertino, prenu lin ĉe unu brako, mi prenos la alian ; ni konduku lin al tiu antaŭrestoracio. Mi timas ke li svenos. Restu momenton kun li : mi mendos tason da lakto. Kelnerino, mi petas, alportu rapide varman lakton kaj freŝan akvon.

A. — Li ne odoras je alkoholo ; eble li malsatas.

P. — Pro tio mi mendis freŝan akvon samtempe kun lakto : mi nutros lin. Se mi ne eraras, vi devas rapidi al via hejmo. Do lasu min, ni revidos nin morgaŭ.

A. — Mi venos al vi je la dek-unua ; estu preta (ŝi foriras).

## Dua sceno. Kelnerino - Paŭlino.

Paŭlino. — Mi vetas ke vi supozis tiun homon ebria.

Kelnerino. — Vere mi opiniis, kaj mi miris kiel vi igis lin trinki lakton. Ankaŭ mi miras ke li estas malsata, ĉar li estas tre bone vestita...

P. — Vidu : li malfermas la okulojn, li komprenas kion ni diras. Bonvolu alporti alian tason da lakto kun sukero, mi petas vin.

## Tria sceno. Paŭlino - La Nekonato.

La Nekonato. — Ho dankon. Ŝajnas ke mi svenis. Mi ŝuldas al vi sinceran dankon.

Paŭlino. — Fine vi revivas. Nun vi trinkos duan tason da lakto ; poste vi forglutos pli solidan nutraĵon.

La N. — Iom post iom mi komprenas kiel mi estas ĉi tie. La fortoj mankis al mi. Feliĉe vi ne opiniis min ebria.

P. — Ne, sed mi miris ke vi tiagrade malsatis.

La N. — Poste mi rakontos al vi, kio okazis. Nun mi sentas min sufiĉe forta por iri kaj... por manĝi (li vokas) : Kelnerino, bonvolu alporti al ni la karton pri manĝaĵoj (al Paŭlino). Ĉu vi trinkas vinon ?

P. — Jes, sed tre malmulte.

La N. — Ĉar vi trinkas malmulte, mi elektos bonan. Ĉu vi deziras antaŭ-manĝaĵon ? Ĉu vi ŝatas kaviaron ? Ĉu kapreolo plaĉas al vi ? aŭ perdriko kun fungoj ? ĉu vi ne timas glaciaĵon ?

P. — Sinjoro, vi demandas min, sed vi ne atendas la respondon.

La N. — Ĉiu ino esprimas sian guston multe pli klare per sia paŭto aŭ sia rideto ol per longa parolado. Nu, bonvolu diri al mi ĉu mi nomu vin sinjorino aŭ fraŭlino ?

P. — (Ridas). Mi estas fraŭlino, kaj verŝajne ankoraŭ longe.

La N. — Do, fraŭlino, bonvolu atendi min momenton : mi preferas mendi ĉe la kaso (li iras al la malantaŭa parto de la restoracio). (kiam li revenas) : Ni tuj ricevos vespermanĝon.

P. — Mi supozas ke via demandaro pri mia gusto estis nur ŝerco.

La N. — Duonŝerco. Ĉu mi estas trudiĝema demandante vin kial mi devos ankoraŭ longe nomi vin fraŭlino ?

P. — Vi ne pekis, ĉar mi nur respondas se plaĉas al mi. Jen la kaŭzo : mi perlaboras mian vivon per ĉiutaga klopodo estante flegistino, kaj junaj kuracistoj bezonas monon por establi sin. Mia metio plaĉas al mi, ĉar mi sentas ke mia laboro estas utila : kiom da vunditoj oni levprenis de la stratoj kaj alportis al ni ! Ĉiuj geflegistoj en mia kliniko helpis savi homajn vivojn.

La N. — Ĉu al vi plaĉas vivi meze en tiuj sangaj vidaĵoj ?

P. — Mi jam diris al vi : mi havas la senton de plenumita devo. Mi ankaŭ diru ke ni estas morale subtenataj de nia klinikestro. Kia admirinda homo ! Kiel danka mi estas al li kaj al lia edzino. Se mi edziniĝus...

La N. — Do vi konsentas ke vi povus edziniĝi ?

P. — Ha, sinjoro ! Kiom da hazardoj devus trafi unu alian ! Kia hazardo ke mi renkontos homon, kia estas mia estro, ke ni plaĉos reciproke, ke li estos fraŭlo, ke li deziros edziĝi...

La N. — Ĉu vi ne forgesas unu kondiĉon ?

P. (ruĝiĝas). — Ne, mi ne forgesas tion, kio ŝajnas al mi la precipa kondiĉo...

La N. — Do vi ne rajtas nei ekziston de amo pro tio, ke vi ĝis nun ne amis !

P. — Kiu diris al vi ke mi neniam amis ?... (ŝi parolas mallaŭte, kiel al si mem). Antaŭ kelkaj monatoj oni alportis al ni vunditan junulon ; mi devis okupiĝi pri li. Kiam li diris sian nomon : Labarre kaj la nomon de sia naskiĝurbo (Calais) mi rimarkis ke li estas nord-franco kiel mi ....

La N. — Komenco de naciismo !

P. — Ĉu povus esti naciismo kiam du personoj naskiĝis en la sama urbeto, sama strato, sama domo ? Naciismo estas tute alia afero !

La N. —Vi estas prava ; mi diris stultaĵon. Tio ne malhelpu vin daŭrigi.

P. — Calais estas la urbo kie mi sukcesis abiturientekzamenon.... Mi vidis ĉiutage tiun novan vunditon. Li estis agrabla, bel-parola ; li logis min, kaj mi iom tro facile ekenamiĝis... sed unu tagon mi vidis lin ridi malantaŭ mia bonega estrino kaj moki ŝin ĉar ŝi kisis junan orfinon. Mi kredis ke mia koro haltis. Mia amo falis kiel laktosupo sub kiu oni estingas fajron. La saman tagon, li forlasis la klinikon. La sekvantan tagon li revenis kaj diris : « Bonan tagon, fraŭlino Paŭlino ». Mi respondis : « Fraŭlino Paŭlino ne plu ekzistas ». Li komprenis ke mi ne havas tempon por perdi : li ne plu aperis.

La N. — Se mi bone komprenis, vi estas abiturientino.

P. — Jes, mi estas. Mi komencis studi kuracarton.

Mi devis interrompi ; ĉar mia patro mortis, mi devis dungiĝi kiel flegistino ; mi ne povis bone fari samtempe ambaŭ taskojn ; tiel estas kiam oni volas fari neriproĉindan laboron.

La N. — Estus tro facile gratuli vin, dirante ke la interno de via kapo estas tiel saĝa kiel la ekstero estas bela, sed mi ne faros, kvankam tiaj dolĉaĵoj estus agrablaj diri kaj eble agrablaj aŭdi : tia gratulo ne estus inda je vi. Mi respekte salutas vin ; ĝis revido, fraŭlino Paŭlino.

P. — Adiaŭ, sinjoro.

La N. — Mi diris : « Ĝis revido. » (li foriras).

## Kvara sceno. Kelnerino - Paŭlino.

Paŭlino. — (Al si mem). Stranga estaĵo. « Ĝis revido » ! Mi tute ne konas lin. Pri mi li scias ke mi estas flegistino en granda kirurgi- kliniko, ke mi nomiĝas Paŭlino.... Ĉu li intencas serĉi min tra tuta Parizo, kaj trovi min per tiaj informoj ? Nu, mi havis bonan vespermanĝon, sed nun venis la momento pagi (ŝi ekbrulas cigaredon).

Kelnerino (alproksimiĝas kaj prezentas al ŝi cindrujon). Jen objekto kiun vi tuj bezonos.

P. — Dankon, vi estas tre afabla.

## Kvina sceno. Paŭlino - Albertino.

Dimanĉon matene. Ili sidas en la ĝardeno « Tuileries « (en la centro de Parizo).

Albertino. — La hieraŭa vespero estis tre bela, kaj ŝajnas ke tiu tago estas ankoraŭ pli bela. Nu, ĉu ni renkontos denove malsatulon aŭ ebriulon ?

Paŭlino. — Ĉu vi aludas la nekonaton kiun ni helpis hieraŭ dum momento ?

A. — Jes. Rakontu al mi la finon de tiu aventuro. Ĉu vi nun scias kiu li estas, kion li faras ? Ĉu ne estas stranga okazaĵo ?

P. — Certe estas stranga afero. Mi rakontu al vi ĉion detale : kiam la nekonato komencis malfermi siajn okulojn, mi rimarkis ke li parolas tute klare, do ke li estas neniel ebria. Tuj li parolis pri manĝo ; li legis al mi la manĝokarton, kaj babilante ni vespermanĝis.

A. — Ĉu li havis bonan apetiton ?

P. — Bonetan. Manĝante li demandis min multajn informojn pri mia vivo, iom pri estinteco, ankaŭ iom pri estonteco. Antaŭ ol foriri li diris al mi « ĝis revido », kaj kiam mi respondis « **adiaŭ », li rimar**kigis ke li diris « ĝis revido ».

A. — Se mi bone komprenis, tiu delikatulo konsentis vespermanĝi kun vi, kaj ankaŭ konsentis lasi vin pagi la du vespermanĝojn....

P. — Atendu ; vi ne scias ĉion. Kiam mi elektis antaŭmanĝon, kaj poste fiŝon, viandon, postmanĝon, li ne montris al mi la karton, tiel ke mi ne vidis la prezojn, sed mi sufiĉe konas la varojn por scii ke asparagoj, kaviaro, ĉasaĵo, salmotruto, glaciaj fruktoj staras inter la plej multekostaj nutraĵoj, kaj ke oni ne verŝas bordovinon kiel akvon. Plie kiam mi pripensis kiel ni decidis vespermanĝi kune, mi konvinkiĝis ke li mem invitis sin, kaj mi iĝis tute malbonhumora kontraŭ li ; fine lia « ĝis revido » impresis min kvazaŭ minaco : kiel li povas revidi min ? ĉu li atendos min sur la trotuaro en la nokto ?

A. — Do mi vidas ke vi fine komprenis ke tiu aĉulo povus estis danĝera.

P. — Tial mia surprizo... La kelnerino estis akompaninta lin ĝis la pordo kaj reveninta al mi kiam li malaperis en la nokton ; tiam ŝi diris nesindetene : « Li estas en pli bona stato ol antaŭ unu horo. Morgaŭ matene li memoros nur la bonan vespermanĝon ». Mi demandis : « Pri tiu vespermanĝo, diru kiom mi ŝuldas al vi ». « Neniom, ŝi respondis, Ankaŭ la krommonon la sinjoro ne forgesis. Li pagis ĉe la kaso antaŭ ol vi komencis manĝi ».

A. — Nu, li pagis kaj ne staris sur la trotuaro. Sed kiel li intencas renkonti vin ? Povas esti nur la esprimo de deziro : li atendis de vi la respondon : « Se ni devas baldaŭ revidi unu la alian, ni ne bezonas disiĝi... »

## Sesa sceno. Paŭlino - Albertino.

(lundon je la oka matene, en la kirurgia kliniko de D-ro Galou, nomata de la geflegistoj « Ripoj-riparejo ». La fraŭlinoj surmetas siajn blankajn kitelojn).

Paŭlino. — Ĉu vi bone dormis ?

Albertino. — Kiel ŝtono. Lundo estas peza labortago, kvankam la direktoro dungis du pliajn personojn.

P. — Agrabla estas ĉi tiu kliniko, kie ĉio estas antaŭvidebla : neniu surprizo : la hieraŭan direktoron oni estas certa retrovi morgaŭ, la samajn kolegojn, la samajn metodojn, ktp.

A. — Ĉu vi ne ŝatas ŝanĝojn ?

P. — Ne. Post ĉiu ŝanĝo ni trovas nin en nova situacio, ĝenerale pli malbona ol la antaŭa.

A. — Ĉu io nova pri la sabata nekonato ?

P. — Nenio. Verŝajne ni neniam plu aŭdos pri li. (telefono sonoras, P. prenas la aŭdilon kaj aŭskultas) Paŭnjo. Jes, sinjoro, tuj. (al Albertino) Oni atendas vin ĉe la operaciejo kaj min ĉe la direktoro.

A. — Ĉu ni havos ŝanĝojn ?

P. — Espereble ne.

## Sepa sceno. Paŭlino - gesinjoroj Galou.

(Paŭlino staras ĉe la pordo de la direktorejo. Ŝi frapas. Voĉo el la direktorejo). Eniru ! (Ŝi eniras ; sidas s-ro Galou kaj lia edzino).

P. — Bonan matenon. Ĉu vi vokis min ?

Galou. — Bonan. Eksidu, mi petas, Paŭnjo, mia edzino kaj mi konsideras vin kiel amikinon, vi scias tion, ĉu ne vere ?

P. — Certe, kaj mi sentas por vi la saman amikecon.

G. — Nu, nia avantaĝo estus konservi vin tiel longe kiel eble en « Ripoj-riparejo » (P. ridetas), ĉar vi estas imitinda, modela flegistino kaj ni dubas, ĉu ni povos trovi egalan helpantinon...

P. — Ĉu vi volas maldungi min ?

G. — Tute ne. Sed ni devas konsideri ankaŭ vian intereson. Se vi restas ĉi tie vi neniam iĝos doktorino pri medicino...

P. — Mi petas vin, sinjoro, ne daŭrigu : ĉi tie mi estas feliĉa, mi sentas min utila ; vi estas al mi kiel grandaj gefratoj...

G. — Atendu. Jen la afero : unu el miaj amikoj povus dungi vin, kondiĉe ke vi deĵoros ĉiulunde en la « Ripoj-riparejo » ; kompense vi povus daŭrigi viajn studojn ĉe la medicina fakultato. Demandu mian edzinon : ŝi konas la tutan aferon. Ĉu vi ne aprobas, karulino ?

S-ino G. (altiras Paŭlino al si kaj kisas ŝin). Ĉar mi amas vin, Paŭnjo, mi konsilas tion al vi.

P. — Mi timas ke mi bedaŭros mian konsenton ; sen ĝojo mi obeas vin.

G. — Knabinon oni devas konduki al la « Bubejo » morgaŭ matene per nia ambulanco, ĉar la gepatroj restos ĉi tie ankoraŭ plurajn semajnojn. Vi veturos kun la knabino ; ni konfidas ŝin al vi. (ĉiuj adiaŭas. P. eliras).

*(daŭrigota).*

en Esperanto originale verkita de P. BOULOGNE.

# Stanislaw Srokowski tradukita de Jan Smykalski

Stanislaw Srokowski naskiĝis en 1936 en Hnilcz, iama vojevodio Tarnopol, nun Ukr. S.S.R.. Li studis en Alta Pedagogia Lernejo en urbo Opole - Malsupra Silezio. Fariĝinte magistro pri pedagogio kaj pola filologio, dum 12 jaroj li estis instruisto pri la pola lingvo en Ŝtata Mekanika Teknikumo, kunlaborante samtempe kun kulturdomoj kiel kultura estro. Nun de kelkaj jaroj li loĝas en Wrocaw, Pollando, kie li laboras kiel redaktoro, estro de kultura fako en la redakcio de grava, soci-politika, semajna revuo « Wiadomosci » (Novaĵoj).

Stanislaw Srokowski debutis en la jaro 1958. La poeziaĵojn li publikigis i.a. en « Zycie Literackie » (Literatura Vivo), « Poezja » (Poezio), « Tygodnik Kulturalny » (Semajna Kultura Revuo). Li estas laŭreato de multaj literaturaj konkursoj, kaj mem estas recenzisto pri literaturo, teatro kaj filmo.

Li eldonis ses poezikolektojn : « Powiazania » (Kunligoj) Varsovio 1966 ; « Ŝciete Ptaki » (Detranĉitaj Birdoj), Krakow 1967 ; « Strefa Ciszy » (Zono de l'Silento), Varsovio 1968 ; « Rysy » (Trajtoj), « Ossolineum » eld. de la Pola Akademio de Sciencoj, Wrockaw-Varsovio-Krakow 1968 ; « Aktyy » (Aktoj), Krakow 1971 ; « T y, « Ci », Krakow 1971, k.a.

Kiel ĵurnalisto, li publikigis — kaj publikigas plu — grandegan nombron de kulturproblemaj artikoloj, intervjuoj, kritikaj disertaĵoj, ktp.

Aktuale li apartenas al la juna pola generacio de poetoj. Lia poezio, kvankam ĝi estas tute moderna, estas tamen klara kaj tutmonde legebla pro sia ĝeneralpsika, homa problemo de strebado al la bono. Por tiu celo li ne evitas eĉ iuloke la fadenon de amareco, sen kiu la homa vivo ne estus vivo.

Li estas ankaŭ Prezidanto de la Instruista-Verkista Klubo ĉe la Sindikato de la Polaj Instruistoj en Wroclaw kaj la Vroclava Vojevodio. Forte li favoras kaj apogas esperanton kaj precipe esperantan literaturon sur la paĝoj de redaktata de li revuo « wiadomosci », kie preskaŭ ĉiusemajne aperas poeziaĵoj, artikoloj, ĵurnalistaj notoj k.a. tradukitaj el esperanto en la polan lingvon fare de lokaj esperantistoj, i.a. ankaŭ ofte de subskribinto mem.

*enkonduko al la homo*

ĝi ne estas
vakuo post vorto
nek estas ŝlosilo al vakuo
ne estas ŝlosilo al vorto
nek estas ŝlosilo al homo
ĝi estas
doloro plenigita
doloron oni ne povos malfermi
nek fermi oni povas doloron
la homo
en lian vorton oni ne povas
eniri sen frapeto
ne estas deklinacio de l'homo
estas ĝi
renverso kontraŭlumen
kaj senpolvigo de l'vorto
ne kun unu vizaĝo
nek kun sep
pli da lumo
radioskopii la vorton
la vorto havas ftizon
la vorto sputas sangon
la vorto ne vivas
do malpleno post la vorto
nenio el la stelo kiu sekiĝis
formo de l'poto
estas en fingroj de l'potisto
kanto de l'birdo
estas en rolo de l'oreloj
la homo estis pripensita
ne laŭ penso de l'boto
nek laŭpense de l'fingro
klikfermita de l'pordo

*versopejzaĝo*

jen
el vortoj
kunmetita dezerto de l'vers'

kies manoj
traŝutos ĉi sablojn brulitajn

kies piedo
postlasos signojn sur la altaĵ'

kies orelo
krevadon de l'tero ekaŭdos

kies buŝo
soifa
tie sensukiĝos

kies okul'
fermos ĉi spacon sen fino

ĉu estas solul'
kiu trairos
tiun sablon
sen vojmontriloj

*Mortigita pejzaĝo*

1
iam
tiu pejzaĝo
eldiris sin el la homa piedo
prikantis pasintajn arbarojn

2
plenumiĝis en ĝi rokrompo
vana ĉi terdeĉifrado
elskribita el vivo
ĉi
aerkulturado
diveno pri ekflorantaj ĝardenoj

3
kia sigelilo
premsignis tiom da doloro
kies okuloj sekiĝis pro la rigardad'
kaj kies manoj tiel distingiĝis

4
kaj jen
ŝutamasiĝoj de liblanka rankor'
elportitaj sabloj
jen la ombro de l'homo
al ĉarumoj fiksita
nur fermi okulojn

5
ie
ĉi tie
rompiĝas
la mito de l'homo
ŝiriĝas enhavo de tiu pejzaĝo

# POR VIA DISTRO

Pro la malgranda nombro de la partoprenintoj de la konkurso 1972-1973, la redakcia komitato de Kulturaj Kajeroj decidis ne proponi konkurson dum la jaro 1973-1974. Ni, do, prezentas al vi ĉi-malsupre amuzajn problemojn.

## SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

### Unua problemo

La vortoj trovotaj por konstrui la vorto-ĉenon estis :

Leporo — polipo — limako — mateno — teniso — nikelo — kerubo — rubuso — butono — topazo — palaco — lameno — medolo — dogano — gazelo — zeloto — logiko — gitaro — tabako — barelo — rebuso — butero — telero.

### Dua problemo

**Kruc-Vort-Enigmo**

| | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 K | 2 A | M | 3 E | L | O | ■ | 4 P | O | 5 L | U | 6 J | O |
| ■ | D | ■ | D | ■ | ■ | ■ | R | ■ | U | ■ | U | ■ |
| 7 A | V | I | Z | O | ■ | 8 K | A | R | I | B | D | A |
| ■ | E | ■ | O | ■ | 9 R | ■ | G | ■ | ■ | ■ | O | ■ |
| 10 U | N | O | ■ | 11 L | A | N | O | ■ | 12 M | A | J | O |
| ■ | T | ■ | 13 R | ■ | T | ■ | ■ | ■ | A | ■ | ■ | ■ |
| 14 B | O | T | O | ■ | 15 O | R | 16 O | ■ | 17 R | I | 18 D | I |
| ■ | ■ | ■ | M | ■ | ■ | ■ | S | ■ | O | ■ | E | ■ |
| 19 K | 20 E | L | O | ■ | 21 M | U | L | O | ■ | 22 A | S | O |
| ■ | Z | ■ | ■ | ■ | O | ■ | O | ■ | 23 O | ■ | E | ■ |
| 24 M | O | R | 25 T | E | R | O | ■ | 26 T | R | O | G | O |
| ■ | K | ■ | R | ■ | T | ■ | ■ | ■ | S | ■ | N | ■ |
| 27 T | O | R | I | N | O | ■ | 28 A | G | O | N | I | O |

### Tria problemo

La malnova hinda proverbo kaŝita sub la helpvortoj difinitaj estas : « La manojn rigardu de la homo kiun vi volas ekkoni, ĉar lia vizaĝo estas ornamita mensogo.

La help-vortoj estis : Konservatorio — Kuraĝulo — testamento — Dimanĉo — medikamento — Universala Ligo — gimnazio — hajlo — Samovaro.

## NOVAJ PROBLEMOJ

### Unua problemo

**Ĉifra skribo**

La ĉi-supraj misteraj signoj enhavas kelkajn vortojn, kiuj koncernas la proksimiĝantajn festotagojn. Vi bonvolu deĉifri tion. La solvo estas absolute ne kaprompa kaj eĉ tre simpla.



### Dua problemo

**Nombra enigmo**

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 65 literoj. La ŝlosil-vortoj estas :

26 6 14 10 27 22 34 15 = orientazia lando.
20 17 31 32 47 59 49 19 29 39 = fervoja bilet-kontrolisto.
8 20 13 35 32 4 41 25 36 21 55 = norda landaro.
61 38 37 43 51 52 53 54 15 = jarparto.
1 29 17 53 30 46 19 = laktaĵo.
28 24 63 33 58 9 39 = grandegulo.
16 2 3 9 53 45 27 49 7 18 55 = objekto de sinjorinaj revoj.
5 50 14 42 12 15 = kapkovrilo.
11 60 44 64 40 38 17 = oficista enspezo.
23 62 28 4 48 53 22 31 32 19 = vira nomo.
57 59 56 16 29 2 65 39 = rapidega vagonaro.
1 — 65 = malvona ĉina proverbo ; tre stranga, sed eble prava.

# GRAMATIKO PER BONHUMORO



**Skurĝo-indulo**

Sinjoro Direktoro, mi ricevis pri vi multajn plendojn. Ŝajnas ke, ne nur vi travesperas kaj tranoktas kune kun junulinetoj, sed rilate viajn inajn oficistojn, vi uzas manierojn, kiuj estas tute aliaj ol intelektaj[e]! Tial, ĉi-jare, vi ricevos nur punvergojn !

---

## PLURALO

**Difino (P.V.).** — Pluralo montras, ke oni parolas pri pluraj personoj aŭ aferoj, **J** signas pluralon ĉe substantivo, adjektivo kaj pronomo : tiuj ĉi revuoj estas la viaj.

## RIMARKOJ

1) Pluralo estas ankaŭ uzata.

— **ĉe objekto konsistanta** en pluraj partoj : okulvitroj.

— **ĉe GE-vortoj :** gelernantoj ; geonkloj.

2) Ar kaj Ad substantivoj staras en pluralo, kiam ili montras :

— **plurajn grupojn :** arbaroj[e]; brutaroj.

— **plurajn agentojn :**
la konkurencaj armadoj ; la turniĝadoj de la dervîŝoj.

## ESPRIMOJ

— ambaŭ ; grandnombra ; multe da.

— ni havas por fari pli ol unu rimarkon (plurajn).



**Modernaj ritmoj**

Kiom ajn ni klopodas, vi supren, kaj mi malsupren, ni neniel povas, pri iliaj piedbatoj kaj iliaj vivukrioj tiel sinkope ritmitaj, aŭdigi nin de tiuj frenezuloj !




**Oportuna momento**

Atentu, estos baldaŭ la 24-a horo. Ke ĉio okazu je la ĝusta momento. Tiamaniere, la najbaroj pensos, ke la ĉi tieaj proprietuloj kaj iliaj amikoj, samtempe saltigante la korkon de multaj ĉampanbotelegoj, ĝoje komencas la novan jaron.

# Niaj perantoj

**Aŭstrio :** S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (66 aŭstr. ŝil.).
**Belgujo :** S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux. BARCHON, Lg. (120 fr.).
**Britujo :** S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (140 p.).
**Danlando :** S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (20 kr.).
**Finnlando :** S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (13 mk.).
**Germanujo Okc. :** S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (9,3 mk.).
**Hispanujo :** S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (170 pes.).
**Japanujo :** S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (900 jenoj).
**Jugoslavio :** Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (48 d.).
**Nederlando :** S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk. 209721 (9 guld.).
**Norvegujo :** S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (18 kr.).
**Peruo :** S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
**Pollando :** Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.
**Rumanio :** S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.
**Sovetunio :** S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.
**Svedujo :** ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (13 kr.).
**Svislando :** S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (11 fr.).
**Tajlando :** S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (4 us. dol.).
**Usono :** S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (4 dol.).
**Allaj landoj :** Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (18 respk.),




KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

**ESPERANTISTA KULTURDOMO**

**De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn**

***Akceptas :***

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

***VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO***

**Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :**
**ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ** (Maine-et-Loire) Francujo



Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier — Le Gérant : P. BABIN

*Supplément au n° 6 de 1973, de « KULTURAJ KAJEROJ »*

# LA VIE DE GRÉSILLON

## ENTRE NOUS...

Le conseil d'administration réuni le 21 octobre a préparé le programme 1974. Il a répondu favorablement à la demande de U.F.E. et J.E.F.O. d'organiser à Grésillon la Printempa Kultura Semajno à la fin du mois de mars. Mais étant donné que cette semaine culturelle ne durera que du 23 au 29 mars et que les vacances scolaires ne se termineront que le 3 avril, il a décidé de mettre en œuvre son projet de Séminaire d'Etudes Supérieures qui aura lieu du 23 mars au 2 avril. Ce séminaire qui comportera des cours et des conférences sera conçu comme une information et une formation des professeurs d'Espéranto plutôt que comme une préparation au Kapableco et au Pedagogia Atesto.

Le programme de l'été sera un peu modifié. Il comportera trois périodes de trois semaines. Il n'y aura pas de changement pour la première et la troisième périodes, consacrées en priorité aux cours de divers degrés. La deuxième, qui jusqu'à l'an dernier ne durait que deux semaines, en durera trois en 1974. Le cycle des conférences qui y seront faites portera sur deux ou trois grands thèmes dont le titre exact sera bientôt défini. Les excursions seront dans la mesure du possible une illustration de ces thèmes. Des activités annexes seront proposées. Enfin, la quatrième période, qui ne semblait intéresser qu'un nombre restreint de personnes est supprimée et remplacée par un stage de travail pour les responsables de la Maison.

Après l'audition du bilan provisoire de l'année 1973 il a semblé indispensable au Conseil d'administration de procéder à un réajustement des prix de pension, rendu nécessaire par l'augmentation des salaires et surtout des denrées alimentaires et des combustibles.

Le Conseil d'administration a tenu à remercier le bureau de l'Association Culturelle, et à travers lui, tous les membres et donateurs qui ont pu, par un versement de 8.000,00 F., permettre le règlement des premières factures relatives à l'aménagement de la salle de conférences. Celle-ci a reçu, depuis l'été, ses ouvertures neuves, maintenant vitrées et peintes, et à la date de la parution de ce numéro de la revue l'installation électrique aura été faite. Il restera l'aménagement intérieur. Nous savons que l'Association Culturelle fera tout son possible pour mener jusqu'au bout l'aide qu'elle a décidé de nous apporter avec votre soutien à tous.

Il faut que le Château de Grésillon assume pleinement son rôle de centre culturel, non seulement national, mais international. Il faut lui en donner les moyens.

P. BABIN.

## NOS JOIES

Nous sommes heureux de présenter tous nos voeux à la petite Karin, petite fille de nos amis Waard, et nos félicitations aux parents et aux grands-parents.

## NOS PEINES

Nous avons la grande douleur d'apprendre à tous les amis de Grésillon le décès de Thérèse Levrard que tout le monde appelait Levrette. Son dynamisme avait enchanté de nombreux moments de la vie de Grésillon.

---

## ASSOCIATION CULTURELLE DES AMIS DE GRÉSILLON

(C.C.P. Nantes 2 512 17 — Adhésion simple : 5 frs)

LISTE DES ADHERENTS ET DONATEURS

| | |
|---|---|
| Mak-Edery Elie (Nice) | 25,00 |
| Julien Marcel (Aix-en-Provence) | 100,00 |
| Micard M. Thérèse (Epineux-le-Seguin) | 5,00 |
| Micard Jean (Caen) | 5,00 |
| Galher Bruno (Glinde) | 8,71 |
| Lavallée (Le Havre Bléville) | 100,00 |
| Boissou Pierre (Paris) | 15,00 |
| Frangeul (Angers) | 10,00 |
| Nord'Franca Federacio (Arras) | 5,00 |
| Gerlier Edmond (Nimes) | 25,00 |
| Benazet (Perpignan) | 15,00 |
| Bracquemont Guy (Clermont-Ferrand) | 55,00 |
| Dieusaert Gaston (Courbevoie) | 10,00 |
| Chasseriaud Louis (Royan) | 55,00 |
| Villanova Julia (Marseille) | 10,00 |
| Rougetet Gabriel (St-Germain-en-Laye) | 50,00 |
| Métivier Pierre (St-Martin) | 15,00 |
| Musset Gérard (Angers) | 10,00 |
| Cousin J.-Pierre | 25,00 |
| Etienne Pierre (Malzeville) | 10,00 |
| Batailler Gabriel (Eguilles) | 10,00 |
| Bénaïm Henri (Agen) | 10,00 |
| Clavier (Caluire et Cuire) | 5,00 |
| Friedlander Pierre (Suresnes) | 10,00 |
| Frangeul Arlette (Angers) | 10,00 |
| Garrigue (Marseille) | 10,00 |
| Montagne Paulette (Evreux) | 10,00 |
| Le Romancer Roger (St-Nazaire) | 10,00 |
| Bourdelon Honoré (Marseille) | 10,00 |
| Schertzer Edouard (Illkirch Graff.) | 10,00 |
| Beau Jean (Velaux) | 15,00 |
| Cortes Henriette (Nantes) | 5,00 |
| Turbillon Juanita (Tours) | 50,00 |
| Dumarquez Achille (Arras) | 5,00 |
| Regard Henri (Orléans) | 10,00 |
| Dardarin (Thouars) | 35,00 |
| Billemaz Cavalier (Lyon) | 5,00 |
| Laurenti Huguette (Montpellier) | 10,00 |
| Marin Jean-Jacques (Bagnolet) | 20,00 |
| Robert Michel (Marseille) | 30,00 |
| Bonnafous Elise (Carpentras) | 10.00 |
| Fort Pierre (Fontaine-les-Grés) | 5,00 |
| Claitte Jeanne (Villefranche-sur-Saône) | 10,00 |
| Jouis Edgard (Bois-Guillaume) | 10,00 |
| Julien Marcel (Aix-en-Provence) | 5,00 |
| Amouroux Jean (Perpignan) | 20,00 |
| Villegier (Aix-les-Bains) | 60,00 |
| Vierne Yvette (Montpellier) | 10,00 |
| Maurice Jeanne (Troyes) | 10.00 |
| Vazon Jeanne (Thouars) | 5,00 |
| Vazon Blanche (Thouars) | 5,00 |
| Jouvin Pierre (Le Grand Quevilly) | 15,00 |
| Legret Alphonse (Vire) | 6,00 |
| Le Mercier (Brest) | 10,00 |
| Mourgues Augustes (Montpellier) | 5,00 |
| Louys Jacqueline (Besançon) | 105,00 |
| Kohler Elisabeth (Besançon) | 305 00 |
| Colin Robert (Vitel) | 15,00 |
| Fournier Jean (Bergerac) | 20,00 |
| TOTAL : | 1 554,71 |

---

# Maison Culturelle Espérantiste

## Programme 1974

### *Pâques*

**du 23 mars au 2 avril**

**SEMINAIRE D'ETUDES SUPERIEURES**

**Pédagogie des langues vivantes**

Pendant cette période :

**23 mars au 29 mars**

**13e SEMAINE CULTURELLE**

organisée par J.E.F.O., sous les auspices de U.F.E.

**causeries, débats, soirées culturelles et récréatives**

### *Été*

**PREMIERE PERIODE**

**1er au 21 juillet**

**SEMAINES CULTURELLES ESPERANTISTES**

**Trois cours de niveaux différents - Activités diverses**

**DEUXIEME PERIODE**

**22 juillet au 11 août**

**SEMAINES INTERNATIONALES**

**Conférences-débats axées sur la question suivante :**
« L'homme qui a inventé l'outil, puis la machine, pour survivre, peut-il en rester le maître ? »
**Excursions - Activités diverses**

**TROISIEME PERIODE**

**12 août au 2 septembre**

**SEMAINES D'ETUDE**

**Trois cours de niveaux différents - Activités diverses**

---

Demandez le programme détaillé
Retenez vos chambres sans tarder
**Maison Culturelle Espérantiste**
**Château de Grésillon - 49150 BAUGÉ**

# CONSEIL D'ADMINISTRATION DU 21 OCTOBRE 1973

La séance est ouverte à 10 heures sous la présidence de M. Babin. Sont présents : Mmes et MM. Babin, Bodereau, Benistant, Boyet, Cheverry, Ciret, Dairon, Guillot, Jacquesson F., Jacquesson P., Jelenc, Mathé, Métivier, Micard. Se sont fait excuser : Mmes et MM. Chevallier, Guillaume, Philippeau, Mlles Vazon.

**STAGES DE L'ETE 1973 :**

*Première période :* adminstration : M. et Mme Babin. Une forte participation pendant les deux dernières semaines (120 personnes) due à la présence des stagiaires de l'I.C.E.M. (pédagogie Freinet) ; les trois cours habituels dirigés par Dominique Babin, M. Le Magadure, M. Babin ont été bien suivis, mais les I.C.E.M. ayant leurs activités propres l'après-midi, il serait peut-être souhaitable à l'avenir de renverser l'ordre des priorités.

*Deuxième période* : administration : M. et Mme Guillot. Quinzaine internationale. Selon les responsables un stage assez morne car il semble y avoir un décalage entre ce que la M.C.E. veut faire et ce que les stagiaires recherchent. 16 personnes n'étaient pas espérantistes ; le débat s'engage sur l'opportunité de cours et les activités possibles durant cette période.

*Troisième période :* administration : Mme Bodereau, Mme Ciret. Pas de problème majeur sauf pour la troisième semaine où s'est fait sentir un net manque de personnel de ménage. Les trois cours ont eu lieu comme prévu sous la conduite de Evelyne Le Magadure pour le premier degré Ludoviko Valles pour le deuxième et M. Ribot pour le troisième. Présence de l'O.R.T.F. pour l'enregistrement d'une émission sur France culture sur la Maison Culturelle et ses activités. Cette émission qui a eu lieu le 7-10-73 a été honnêtement faite, mais le titre de la production est regrettable (« le monde de l'insolite »).

*Quatrième période :* administration : Mme Ciret. Cours assurés par M. Benistant. Peu de monde : de 3 à 12 personnes.

*Passages :* deux groupes en fin de saison : 62 Ecossais pour coucher et petit déjeuner dans le cadre du jumelage avec l'Olympique Beaugeois ; entre 70 et 90 personnes pour un dîner de « La Taverne aux Poètes ».

**BILAN FINANCIER :**

*Recettes :*

Les recettes séjour de 1973 (110 000 F) sont inférieures à celles de 1972 (supérieures à 130 000 F) et supérieures à celles de 1971. Cela s'explique en partie par la proximité du Congrès international cette année. Les recettes tickets ont été sensiblement équivalents à celles de 1972.

*Dépenses :*

Sont équivalentes à celles de 1972 ; il faut noter que sont en nette augmentation les dépenses de chauffage et d'alimentation ainsi que les charges sociales ; il a été créé cette année une taxe de 10,10 % au 1-7-73 pour les accidents du travail ; cette nouvelle charge de la Mutualité Sociale Agricole fait double emploi avec l'autre assurance ; M. Babin attend l'explication de cette charge supplémentaire.

Dépenses salaires : 10 000 francs. Charges sociales : 6 000 francs.

*Disponibilités au 17 octobre 1973 :*

C.C.P. : 12 705 francs.

B.N.P. : 13 000 francs environ.

Ca. E. : 25 000 francs soit 51 305 francs environ ; après paiement des factures restantes il devrait y avoir à disposition environ 20 000 francs ; les investissements ne pourront donc pas dépasser cette somme cette année (contre 40 000 francs en 1972).

*Prix des séjours 1974 :*

| | séjours de plus de 3 jours | séjours de moins de 3 jours |
|---|---|---|
| Chambre 1 pers. : | 33 F. | 40 F. |
| Ch. 2 à 5 pers. : | 29 F. | 35 F. |
| Ch. commune : | 24 F. | 29 F. |
| Campeur : | 23 F. | 23 F. |
| Enfant 3 à 6 ans : | 15 F. | 17 F. |
| Enfant 1 à 3 ans : | 7 F. | 8 F. |
| Enf. moins de 3 ans : gratuit | | |

Le repas sera compté à 12 F. vin et café non compris.

Le prix des abonnements à Kulturaj Kajeroj est majoré de 5 F. à partir du 1-1-1974.

**STAGES DE LA SAISON 1973-1974 :**

*Noël 1973 :* stage de 20 à 25 personnes du 27-12 au 2-1.

*Pâques 1974 :* stage du 23 mars au 2 avril. La Maison Culturelle sera ouverte au stage U.F.E. du 23 au 29 mars. U.F.E. assurera l'animation culturelle ; M. et Mme Babin, l'administration.

*Eté 1974 :*

première période : 1 au 22 juillet : administration : M. et Mme Babin.

deuxième période : 22 juillet au 12 août : administration : M. et Mme Guillot.

troisième période : 12 août au 2 septembre : administration : M. et Mme Dairon.

**TRAVAUX DIVERS :**

Six chambres ont été refaites ; est en cours l'aménagement de la salle de conférence.

La réfection de l'installation électrique a été commencée le 10 octobre (coût : 2 617 F) ; *sont projetés :* le déplacement du compteur E.D.F. (200 F.), l'alimentation du deuxième étage (bloc sécurité, minuterie : 4 434 F.), l'aménagement de la lingerie, l'évacuation des eaux usées vers la fosse septique ; la tapisserie de la cage d'escalier.

**ASSOCIATION CULTURELLE DES AMIS DE GRESILLON :**

Les recettes à ce jour s'élèvent à 10 215,84 F.

Les dépenses engagées s'élèvent à 8 000,00 F., somme que l'Association fait parvenir à ce jour à la Maison Culturelle.

L'Association lance un appel à cotisations.

Le C.A. remercie l'Association Culturelle ainsi que les souscripteurs dont les noms continuent à paraître dans K. K.

**QUESTIONS DIVERSES :**

Le contrat de Mme Corvaisier arrive à expiration le 3 septembre 1973. Le contrat à venir sera proposé sur une base de 1 500 h. année, au taux du S.M.I.C. actuel (5,30 F) avec réajustement en cours d'année, ce qui représente une augmentation de plus de 100 F. par mois.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 17 h. 50.

Le secrétaire de séance,

F. Mathé.

## NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

**Cours 1er degré.** — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 2e degré.** — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

**Cours 3e degré.** — Excellent **entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes.** Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons **fournir les livres de** cours à **ceux qui ne les possèdent** pas déjà.

## POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

**POR LA PRAKTIKANTOJ**

**de P. Babin**

Prix : **8,50 F.**

**VOUS POUVEZ COMMANDER**

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

**à M. CIRET**
route de la Boulerie
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

**MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE**
C.C.P. Nantes 1485-39

**Prix franco au-dessus de 10 Fr.**

Demandez notre catalogue

**NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :**

Cartes postales de Grésillon :

| | |
|---|---|
| noires : | 0,50 F. |
| couleur : | 0,60 F. |
| Cuillères de collection : 9,00 et | 12,00 F. |
| Pendentifs : | 7,00 F. |
| Disques de stationnement : | 3,00 F. |
| Etoiles pour vitres de voitures : | 1,00 F. |

et :

**Les Héros Existentialistes**

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 10,00 F.).